| SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio | El Vol. 28 n-ro 4(126) 30.08.1977. |
| --- | --- |

# TASKOJ DE HOMO LIGE KUN LA TRANSFORMADO DE LA NATURO

(ARMAND D.L.,MOSKVO, SOVETIO)

En ĉi tiu artikolo temas pri prognozoj kaj, kiel ĉiam en tiuj okazoj en ĝi estos starigitaj pli da demandoj ol donitaj la respondoj. Sed al mi ŝajnas, ke ilia starigo ankaŭ povas alporti utilon.

En nia tempo oni multe skribas pri la malpurigo de la medio. Sendube tio estas grava problemo. Vojoj de ĝia solvo estas difinitaj, dume ne plene, sed ĉefaj direktoj jam konturiĝas. Mallonge dirante, tio estas produktado en fermita ciklo. Tamen antaŭe riveliĝas problemo eĉ pli serioza - la problemo de nenorma interŝanĝo de ĉefaj gasoj inter la geosferoj, konsistigantaj landŝaftan sferon.

Dum la lastaj jarcentoj la homaro ekstermis inter 1/2 kaj 2/3 de ĉiuj arbaroj kaj dum la lastaj jardekoj kovris per naftaĵoj konsiderindan parton de la akva surfaco. La ambaŭ procezoj kaŭzas malpliiĝon de la oksigen-enhavo en la atmosfero same kiel la bruligado de hejtaĵo en elektrocentraloj kaj metalurgiaj fornegoj. Ĝia enhavo en akvejoj malgrandiĝas ankaŭ pro ilia bonnutrado. Maturiĝis la neceso terglobe bilanci la oksigenon registrante ĉiujn kreojn (fotosintezo, vulkanismo, fotokemia malkompono de la akva vaporo k.a.) kaj foruzojn (homa kaj animala spirado, arbaraj incendioj, putrado, fiksiĝo en roktavoloj k.a.). Tiudirektaj provoj estas faritaj, sed ili dume donas tro proksimumajn grandojn kaj ne konsideras ĉiujn bilancopartojn. Tiu tasko estas laŭforta al tiaspeca organizo kiel Internacia geofizika jaro. Tia bilanco necesas

por karbonduoksido - gaso, kies kvanto estas pleje dinamika kaj kiu ĉiam en pli grandaj kvantoj estas eligata kiel flanka produkto de la energetiko, metalurgio, aŭtotrafiko kaj aliaj mastrumbranĉoj. Necesas determini ekde kiu koncentriteco karbonduoksido iĝas danĝera por homoj kaj animaloj kaj ankaŭ por la termoekvilibro de la atmosfero. Povas esti ke baldaŭ ni estos devigitaj konsideri kvantojn ankaŭ de ozono kaj de aliaj gasoj. Iliaj bilancoj estos la unua paŝo por reguligi iliajn kreon kaj foruzon.

Kiom da arbaroj kaj pura oceana surfaco necesas por ke la bilanca saldo de la oksigeno ne iĝu negativa? Kie devas lokiĝi ĝiaj proviz-fontoj? Rilate al la arbaroj oni devas determini tion konsiderante ilian hidrologian, kontraŭerozian, sanigan, rekrean kaj estetikan signifojn kaj ankaŭ ĝeneralan atmosferan cirkuladon. Poste, kiam eblos organizi unuecan mondan planadon, sciencaj konsiloj decidados en kiuj regionoj oni prefere evoluigu agrikulturon kaj konstruu urbojn kaj industrion, kaj kiujn okupu per arbaraj fabrikoj de oksigeno. Eblas pensi, ke tiu tasko plifaciliĝos, kiam estos evoluinta produktado de sintezaj manĝaĵoj, do la homaro iĝos malpli ligita al la grandaj areoj de nutrokulturoj.

Sendube, pli aŭ malpli frue estos inventita ankaŭ procedo de industria fotosintezo. Tiam la homoj ekpovos elekti tion, kio estas pli profita, kio estigas pli komfortajn viv-kondiĉojn: konstrui inter urba aglomeraĵo grandan kompensan oksigenan uzinon aŭ ĉirkaŭigi kaj saturi la aglomeraĵon per ekvivalenta areo de arbaroj kaj akvejoj. Uzo de la oksigeno povas malgrandiĝi rezulte de la transigo de energetiko al senpera transformiĝo de la nuklea, radia, termika, mekanika specoj de energio en la elektran.

Oni devas memori, ke ne nur la jaraĝo de parkoj, arbarplantado, terplibonigo rilatas al la transformo de la naturo, sed tio estas ankaŭ ĉiu konstruado, ĉiu produktado, eĉ kun fermita ciklo. Fakte ĉiaspeca homagado kondukas al la transformo de la naturo, se dum ĝi ŝanĝiĝas mediaj kondiĉoj aŭ estas konsumataj naturrezervoj. Ĉiu el ili devas esti efektivigata kun konsidero de ĝia kontribuo al la komfortigo de la planedo, al la farto de la homoj inkluzive antipodulojn.

Vico da problemoj aperas en la sfero de rilatoj de la homo kun la animala mondo. Se rilate al la planta mondo ili estis decidataj surbaze de racieco, de la maksimuma produktado de la krudmaterialoj, manĝaĵo, oksigeno kaj "nevideblaj utilaĵoj" kaj ne leviĝis super la estetika percepto de la homo, ĉi tie al la menciitaj aldoniĝas ankaŭ la etikaj problemoj, ĉar la afero tuŝas vivestiĝojn, certagrade similajn al ni.

Konstruante sian civilizacion, la homoj laŭvoje pereigas sovaĝan faŭnon. Sur grandegaj spacoj de kulturaj landoj jam preskaŭ ne troveblas animaloj, krom malmultaj adaptiĝintaj specioj. Parte tio estis neevitebla. Sed ni pensu, ĉu ne eblas preventi pluan ekstermon. Ni rigardu antaŭ ĉio vidpunkte de la homa utilo: ĉu povas la homaro vivi sen la animaloj? Kredeble jes, sed spertos

senduban perdon. Estas konataj ekzemploj, kiam la ekstermo de birdoj portis damaĝon al la agrikulturo, kiam tiu ekstermo akcelis disvastigon de insekticidoj, kiu siavice venenis ĉion vivan kaj venenigis nutraĵojn, kiam la ekstermo de teraj vermoj malbonigis mekanikajn kaj kemiajn ecojn de pedoj+/; kiam la ekstermo de birdoj malebligis la reproduktadon de certaj kulturaj plantoj.

Tre delikata kaj specifa estas la kemia konsisto de organismoj. Ĉiu specio ludas sian rolon en la metabolo, ĉiu specio akumulas en si kaj metas en grundon aŭ akvojn certajn mikroelementojn, kiuj povas esti necesaj por homoj.

Ĉu povas la homo anstataŭigi per teknikaj rimedoj kolosan, komplikegan laboron de organismoj, kies rezultojn unuafoje taksis V.I. Vernadskij? Mi dubas. Ĉiuokaze ne estas senco por homoj preni sur sin la taskon, kiun sur pli profesia nivelo sukcese plenumas la naturo.

Mi jam ne parolas pri bioniko&/. Dum jarmiliardoj kiujn la naturo havis en sia dispono, ĝi atingis tian rafinecon, kreis tiajn admirindaĵojn, ke la homaro, ricevinta eblon ilin kopii, povas opinii, ke ĝi ege bonŝancis. Estus ekstreme malsaĝe simple formanĝi tiujn kreitaĵojn.

Rigardu ni nun de alia flanko, morala. La homo estas la plej sukcesa infano de la naturo. El milionoj da eksperimentoj de ĝi faritaj nur unufoje ĝi sukcesis krei organismon, kiu leviĝis ĝis la intelekta evoluo. La ceteraj haltis sur mezaj stadioj, kvankam estas ne esceptita eblo, ke ankaŭ ili evoluus pluen, se ili havus rezerve ankoraŭ kelkajn jarmilionojn.

Kiaj rilatoj devas kreiĝi inter la homaro kaj aliaj specoj post tio, kiam ĝi forpelis ilin en forajn rifuĝejojn kaj stabiligis sur la Tero sian absolutan hegemonion? Logika fino de la procezo ŝajnas esti ilia plena ekstermo, same kiel la homaro jam ekstermis centojn da specioj kaj sklavigis nemultajn elitajn kiel bovinoj kaj porkoj. Sed ĉu ne eksentos ni solecon en la mondo, se oni senigos nin de niaj malantaŭiĝintaj kamaradoj laŭ la evoluo? Mi pensas, ke la unua lernanto devas senti profundan seniluziiĝon. Kaj ĉu ne estus pli digna por rango "caro de la naturo" establi regadon, kiu garantius almenaŭ tolereblajn kondiĉojn de la ekzistado por ĉiuj ĝiaj subuloj?

Se malaltiĝi de la etikaj konsideroj al materiaj kondiĉoj, tiam "la digna regado" povas signifi jenon. En ĉiuj zonoj kaj naturaj regionoj devas esti elektitaj laŭeble vastaj teritorioj (multe pli vastaj ol naturrezervejoj), leĝaj loĝlokoj de la sovaĝa faŭno. Por ŝpari la areon tiuj rezervejoj povas esti kunigitaj kun naturaj parkoj - lokoj de reguligata kultura turismo kaj ripozo de la loĝantaro, kies areo egale devas esti multoble grandigita. Poste necesas serioze akceli la reprodukton kaj disvastigon de filtriĝantaj specioj, t.e. de tiuj kiuj povas vivi sur kulturaj terenoj apud la homoj, kiel vivas sciuroj kaj multaj birdoj en urbaj parkoj, se la homoj ne persekutas ilin, aŭ

---

+/pedo - supra fekunda tavolo de grundo.

&/bioniko - bioelektroniko. Uzo de biologiaj procezoj en tekniko.

kiel perdrikoj sur kampoj en Anglio kaj Ĉeĥoslovakio. Arbaraj strioj, stepaj bosketoj kaj ravinaj arbaroj povas iĝi ujo por riĉa kaj diversa faŭno, certe nur por iuj specioj, kiuj ne malutilas la semitaĵojn.

Ĉi tie eblas antaŭvidi malfacilaĵon: ĉiu populacio emas senlime kreski tuj, kiam trafas favorajn kondiĉojn. Animaloj, ĉar ne espereblas la enkonduko de familia planado far ili kaj ĉar la homoj pro la propra sekureco estas devigataj limigi kvanton de la rabobestoj, superplenigados apartigitajn por ili terenojn, neniigados vegetaĵojn kaj finfine mem malsatos kaj degeneros. Tial la homoj mem devas preni sur sin la zorgon pri la subteno de la populacioj sur maksimumaj, sed eblaj niveloj. Tion oni faru ne per la ĉasado, ĉar ĉasistoj kutime distingas nek sekson, nek aĝon, nek staton de mortigota predo kaj ankaŭ ial, ke la ĉasado pro distro malĉastigas la homon, sugestas al li penson pri la permeseblo mortigi ĉiun malpli fortan ol li mem. Kaj poste oni povos tion apliki al homo. Ne hazarde ŝtelĉasistoj tiel facile levas la armilon kontraŭ la ĉasinspektistoj. Fusilado de superfluaj animaloj devas iĝi malgaja funkcio de profesiaj bestinspektistoj, mortigontaj animalojn nur de tiuj kategorioj kaj en tia kvanto, kia estas fiksata far biologoj-ĉasologoj. Escepto povas esti farita nur por popoloj, kiuj vivtenas sin precipe per ĉasado, kiel ekzemple malgrandaj popoloj de Siberio kaj Kanado, kvankam kun la progreso de civilizacio ankaŭ ilia dependeco de best- kaj vegetaĵakirado malgrandiĝos.

Senkondiĉe estas neniigendaj la eksteraj kaj internaj parazitoj de la homo. Ĉar ili aperis nur post la apero de la homo kaj ĉar ilia biomaso estas mizera, ili ne povas ludi rimarkeblan rolon en la metabolaj procezoj. El subaj animaloj adaptiĝintaj al la nutrado per kulturaj plantoj estas ekstermendaj tiuj pri kiuj estas science pruvite, ke ili ne ludas gravan rolon en ekonomio de la naturo.

Samtempe kun la defendo ne escepteblas la evoluo de mensaj kapabloj de iuj ... da progresivaj animalaj specioj sub trejna influo flanke de la homo aŭ direktitaj mutacioj.

Tiamaniere konturiĝas eblo de la paca kunekzistado de la homo kun la mondo de animaloj kaj plantoj, kies supera ano li mem estas. Alternativo al tio povas esti nur milito ĝis plena ekstermo de la "malamiko" kun ĉiuloka disvastiĝo de la urbega civilizacio. Tio estos vere la Pirra venko.

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio | El Vol. 28 n-ro 4(126) 30.08.1977.

# DISPUTO PRI LIBRO FAR E.P.SVADOST "KIEL APEROS UNIVERSALA LINGVO?

(D.L.ARMAND, MOSKVO, SOVETIO)

*Ermar Pavloviĉ Svadost:"Kiel aperos universala lingvo?", Moskvo, 1968, 288 p., 22 cm, 11500 ekz. Ĉi tiu libro estis fakte la unua serioza pri tiu problemo en la rusa lingvo dum la lastaj 30-40 jaroj.*
*Pro tio elpaŝo de D. Armand sur aŭtoritata tribuno de la Moskva ŝtata Universitato (aranĝita de ties Esperanto-societo) estis aparte grava. Post la disputo E.P. Svadost, al kiu oponis ankaŭ elstara E-veterano N.F. Danovskij, publike konfesis siajn erarojn rilate Esperanton kaj promesis forigi ilin en la dua eldono de sia libro. Baldaŭa morto de Svadost malebligis tion.*
*Kvankam pasis 9 jaroj post la disputo, tiu brila polemikaĵo de D. Armand, ne perdis sian altiran freŝon. Ĝi ne nur reflektas specifon de la movado por Esperanto en Sovetio, sed ankaŭ armigas ĉiun esperantiston per koncizaj kaj trafaj argumentoj.*

*La tradukinto*

Libron "Kiel aperos universala lingvo?" eblas dividi en 3 partojn: 1) argumentoj por la defendo de artefarita internacia lingvo, 2) kritiko de projektoj de artefaritaj lingvoj kaj Esperanto kaj 3) pozitivaj proponoj.

La unuan parton mi plene aprobas, la duan trovas neobjektiva kaj tendenca, la trian - senbaza, utopia.

Mi montros koncize la ĉefajn punktojn, kiuj elvokas mian aprobon, eĉ admiron. Tio estas pruvo de historia kondiĉiteco de la apero de artefarita lingvo, klasifiko de lingvoj laŭ la grado de la artefariteco (p. 219), ekzemploj de la lingva kaoso kaj kontraŭdiroj, devenantaj el la multlingveco (ĉ.II), multaj trafe elektitaj citaĵoj el Maupertuis, Baudouin, Meillet k.a., pruvo de maltaŭgeco de etniaj lingvoj, inter ili la angla, en kvalito de la internacia (p. 164), kritiko de hipotezo de poioma kunfandiĝo de lingvoj dum komunismo (p. 200) kaj multo alia.

Mi devas konstati, ke en tiuj demandoj mi kaj Ermar Pavloviĉ plene estas samvojuloj, kaj por la pruvo de leĝeco kaj neevitebleco de la kreo de artefarita internacia lingvo li faris pli ol iu alia. Bedaŭrinde, niaj postaj vojoj disiĝas.

Esperanto ne kontentigas Ermar'on Pavloviĉ antaŭ ĉio pro tio, ke tiu lingvo pretendas nur modestan rolon de helpa lingvo por la internacia komunikado kaj ne celas forpuŝi la naciajn lingvojn. Li citas el Thorndike, ke al Esperanto aliĝis kune kun aliaj - sciencistoj, diplomatoj, turistoj, ĉiĉeronoj, oficistoj de komunikiĝo kaj radiofonio, sekve ĝi estis necesa ne al la popoloj, sed al la burĝaro kaj ĝia internacia aferaro (p.p.15,21). Mi dankas Ermar Pavloviĉ-n, ke trafinte reprezentantojn de la internacia burĝaferistaro (ĉar mi estas sciencisto, Dealiĝinta al Esperanto), mi, almenaŭ, troviĝas en tia bona kompanio. Dezirante ombri Esperanton Frmar Pavloviĉ skribas, ke pri ĝi entuziasmiĝis iuj reĝoj kaj fabrikposedantoj donadis nomon "Esperanto" al sia produktaĵo reklamcele (p. 127), sed ĉu li ne scias, ke lingvo apartenas al ĉiuj kaj iu ajn povas uzi ĝin ajnacele? Kaj ĉu la rusan lingvon ne uzis kapitalistoj kaj kontraŭrevoluciuloj, kartotrompistoj kaj diversspecaj ekzekutistoj? Kaj ĉu evitos tian sorton proponanta de li lingvo, se ĝi estos kreita? Mi opinias neobjektiva skribi pri internaciaj socioj de katolikoj, spiritistoj, budhistoj - esperantistoj (p. 132), kaj eĉ per unu vorto ne mencii pri la analogaj socioj de kuracistoj, geografoj, juristoj, ĵurnalistoj, blinduloj ktp; Esperanto estas kulpigata pro negranda partopreno de laboristoj en ĝi. Tio estas komuna eco de ĉiuj novaj progresivaj movadoj, ili naskiĝas inter inteligentularo. Ĉu multe da laboristoj estis en la rusa revolucia agado meze de la 19-a jarcento? Kaj interalie tio estas eĉ malĝuste. Mi ĵus venis el Bulgario kaj vidis tie en Esperanto-kluboj amason da laboristoj. En la internaciaj kongresoj estis laboristoj, kvankam la prezoj de la vojaĝo estas altaj kaj laboristoj havas propran internacian union.

Pri la unuaj revoluciaj jaroj li diras, ke sovetaj homoj "kroĉiĝis" al la reklamita Esperanto (p. 129), nebone estas en tiaj ironiaj esprimoj atesti esperantismon de tiuj jaroj. En la Esperanto-movadon iris homoj necedemaj al reklamo, sed konvinkitaj pri tio, ke Esperanto estas komunikilo pleje necesa al la tutmonda proletaro, kiu ekstreme bezonis unuiĝi, sed lerni fremdajn lingvojn ne havis tempon kaj simple forton. Tiuj homoj sankte kredis je unuiĝo de laboristoj kaj multaj el ili oferis por tio siajn kapojn.

Ankaŭ inventinton de Esperanto d-ron Zamenhof ne indas kompromiti. Jen li estas kaj burĝa idealisto, kaj dion kredis kaj al diplomatoj skribis petegante ilin ĉesigi la mondan buĉadon (jen strangulo!) kaj ĉefe "ne rimarkis" alvenon de la revolucio en Rusio (p. 126), ĉar duonjaron antaŭe mortis en okupita de germanoj Varsovio. Kaj cetere vivo de Zamenhof estas ekzemplo de eksterordinara fideleco al la ideo, pro kiu li la

tutan vivon mizeris kaj estis suspektata de la cara polico, anstataŭ esti prospera kuracisto. Ne "esperantistaj" organizaĵoj, sed UNO metis lian naskiĝdaton en la liston de datoj, celebrantaj kontribuojn de la plej grandaj genioj de la homaro.

Historio de Esperanto estas riĉa je heroaj paĝoj. Sentendenca historiulo rakontus pri grandega helpo al militkaptitoj kaj perdintoj de proksimuloj, farita de esperantistoj dum la Unua mondmilito; pri tio, ke nur en Esperanto povis interkompreniĝi la Internacia Brigado, defendanta Hispanion de faŝistoj; pri tio, ke Esperanto helpadis batali al partizanoj de multnacia Balkana duoninsulo; pri tio, kiel iris sur eŝafodon kaj en koncentrejojn esperantistoj de Germanio dum Hitler kaj en Ĉinio dum Ĉang-kaj-ŝek. Fine la aŭtoro devus scii grandan laboron de Universala Esperanto Asocio laŭ programo "Oriento-Okcidento", kleriga ekspedicio en Afrikon, abnegacia laboro de multaj esperantistoj en Hindio, Cejlono, Malio, Madagaskaro kaj aliaj evoluantaj landoj; fine pri la granda rolo, kiun Esperanto ludas en batalo en Vjetnamio. Kial do li skribas, ke esperantistoj troviĝas sub influo de la liberala burĝaro, neniam starigis antaŭ la internacia lingvo celojn servi kiel komuna kleriga lingvo por miloj da gentoj kaj popoletoj de la Tero (p.19). Ĝi ne atingis grandajn rezultojn - jes, sed ĉiam metis tion inter siajn celojn. Fine, mi ne aprobas la manieron de la citado, aplikita de Ermar Pavloviĉ. Citaĵoj de granduloj parolintaj pri la internacia lingvo ĉiupaŝe abrupte finiĝas tie, kie ili proksimiĝas al Esperanto kaj mem la vorto estas anstataŭigata per tripunkto. Tiel estas ankaŭ kun la citaĵoj el Fersman (p. 2), L. Tolstoj (p. 105), Barbusse (p. 293) kaj aliaj. Estas prezentataj postuloj de Maupertuis (p. 91) kaj Couturat (p. 113) al ideala artefarita lingvo, sed eĉ vorto ne estas dirita pri tio, ke Esperanto preskaŭ plene kontentigas tiujn postulojn.

Ermar Pavloviĉ, kiu ĉiam elpaŝas de marksismaj pozicioj, rezonas tre ne marksiste rilate kaŭzojn de la sukceso de Esperanto kompare kun tiuj de aliaj projektoj. "Dank'al la feliĉa cirkonstancaro" - skribis li (p. 123). Ĉu movadoj, kiujn partoprenas milionoj da homoj aperadas hazarde? - Ĉar troviĝas energiaj adeptoj kaj propagandantoj - klarigas li aliloke (p. 103). Sed ĉu aŭtoroj de aliaj projektoj ne havis ilin? Kial do ilia propagando estis ne akceptita? Kiu ne havis patronojn-milionulojn tiuj pereis (p. 152). Tute male. *Interlingua* ĉerpis milionojn el poŝo de Alisa Morris kaj mizeras, dume Esperanton delonge vivtenas nur membrokotizoj, literaturaj enspezoj kaj groŝaj monoferoj, sed ĝia disvastiĝo estas nekompareble plia. Ĉiuj tiuj malkomformaĵoj en la libro aperas pro tio, ke la aŭtoro ne deziras agnoski sole ĝustan, sole vere-

marksisman konkludon: Esperanto venkas tial, ke en sia strukturo ĝi havas objektivajn avantaĝojn, pli bone ol la aliaj kontentigas bezonojn de homoj pri la komunikiloj.

Fine, Esperanto estas kulpigata pro tio, ke "la afero" estas lasita flui senkontrole, fordonita al la publika "iniciativo" (p. 133). Sed kiel aliel oni povas antaŭenigi progresivan ideon? Mi denove uzos la saman komparon: kiel marksismo trabatadis sian vojon? Ja ĝin agnoskis eĉ ne unu eklezio, eĉ ne unu ŝtato.

Kial do tiel koleras Ermar Pavloviĉ kontraŭ Esperanto? Evidente, li ellernis ĝin kaj la lingvo lin ne kontentigas... Tute ne! Li tute ne scias la lingvon. Li paŭtas pro tio, ke Esperanto havas nur du kazojn, diferencaj laŭ finaĵo. En la angla kaj franca ili estas po unu. Kaj nenio, ili vivas normale. Prepozicio "de" havas tri diversajn signifojn malfacile distingeblajn. Li eĉ ne suspektas, ke delonge eniras uzadon prepozicio "far", prenanta sur sin unu el la signifoj kaj la alia neniam estas esprimata per unu prepozicio, sed ankoraŭ ĉiam per adverbo. Vorto "domo" havas kvar diversajn signifojn. En Esperanto por ili estas kvar vortoj "domo, hejmo, magazeno, ripozejo". Mankas komplikaj tempoj. Ili ekzistas, sed ilin oni malofte uzas, ĉar ili malofte estas necesaj. Tre multaj vortoj finiĝas je "aj", "oj" - tio memorigas interjekciojn de doloro. Nur por Ermar Pavloviĉ kaj nur en la rusa lingvo. Li donas frazon "Ĉiuj ĝiaj opinioj, kaj sektoj, partioj kaj sekcioj" (p. 141). Sed mi prenas francan gazeton kaj vidas "L'association pour l'organisation de mission-cooperation technique". Eblas en ĉiu lingvo elekti tian frazon. Kaj "s", kiu tiel fajfas en finaĵoj de la hispana kaj litova lingvoj! Rusa lingvo estas malbona pro tio, ke ne ĉiuj sufiksoj estas produktivaj por la virina genro. Sed la aŭtoro eĉ ne konjektas, ke en Esperanto estas sufikso "ist", konvena al ajna profesio; ke estas apartaj vortoj, kiuj transdonas nocion "infanoj" trisence ktp. Entute ĉiuj konkretaj oponoj, kiuj estas metitaj kontraŭ Esperanto, estas klarigeblaj per simpla nescio de la lingvo. "Provi teorie decidi problemon de tutmonda lingvo sen la antaŭa studo de la internaci-lingvaj projektoj, kreitaj en la tempo de kapitalismo kaj de la historio de la ideo de artefarita internacia lingvo, - estas okupo senutila" ( p. 177-178) - jen vere estas la rimarko, farita de la aŭtoro memkritik-cele.

Esperanto estas kulpigata pro tio, ke ĝi ne evoluas. Kaj pri Ido li diras, ke ĝi pereis, ĉar evoluis (p. 146). Evidente malbone estas, ke Esperanto ne pereis. Interalie aserto, ke Esperanto ne evoluas, estas neĝusta. Ĝi asimilis milojn da novaj radikoj, novajn partikulojn kaj

sufiksojn, novajn parolturnojn kaj regulojn de la sintakso. Ĉu tio ne sufiĉas? Mi konsentas. Sed Esperanto havas senton de memdefendo. Ĝi estas relative konservativa por ne dispeciĝi. Sed kiam ĝi estos agnoskita de internaciaj organizoj, ĝin eblos ŝanĝi pli decide, ĉar estos centro, kiun ĉiuj obeos. Tio estas sana ideo eldirita de Zamenhof mem, kaj la ŝanĝoj estos facile akceptataj, ĉar tiu lingvo estos asimilata ne de infanaĝo, sed en lernejoj. Se instruisto akceptis novan regulon, ĝin aŭtomate akceptis liaj lernantoj.

Fine Esperanto estas malbona pro tio, ke estas konstruita el latinaj kaj germanaj radikoj (fakte pli el la francaj). Ĝi estas akuzata pro malfacileco por neeŭropaj popoloj. Sed lingvon ja necesas krei sur iu bazo, por ke ĝi estu fonetike kaj gramatike unueca. Ĉu eblas krei lingvon sur angla-ĉina-araba bazo? Ermar Pavloviĉ mem ja skribas, ke Esperanto allogis unue multe da rusoj (p. 104), kvankam ĝi preskaŭ ne havas rusajn radikojn. Kiel montras la sperto, japanoj, ĉinoj, indonezoj lernas Esperanton multe pli facile ol eŭropajn lingvojn. Surbaze de ĉiuj lingvoj ankoraŭ neniu kreis internacian lingvon. Principo de mezigo (p. 230) estas absolute absurda: se en la bazo estas du lingvoj, tiam por la aliaj ĉiuj vortoj estas fremdaj, se pli, tiam eĉ popoloj de kiuj estas prenitaj la vortoj ne povos rekoni hibridojn.

Nun pri la tria parto.

Ermar Pavloviĉ proponas krei ne helpan, sed universalan lingvon, kiun ĉiuj parolus eĉ ene de sama nacio. Li skribas, ke apenaŭ neceso en tiu lingvo elvokos principan oponon (p. 248). Treege elvokos, kaj ne nur oponojn pri bezono de tiu komuna lingvo, sed ankaŭ pri bezono de komuna kulturo, kiel la sekvo. Tio estas disputenda demando kaj por solvi ĝin ni ne havas ankoraŭ iujn donitaĵojn. Kun tondo de ĉiuj popoloj kaj kulturoj per sama kombilo prezentiĝas tre malgaja estonto por la homaro.

Mi ne kuraĝas pridiskuti tiun problemon kaj tial limigas min per problemo de helpa lingvo por la komenca tempo. La aŭtoro deziras, ke tiu lingvo enhavu la tutan perfektecon de ĉiuj naciaj lingvoj; sed, unue, scienco ankoraŭ ne donis kriteriojn de la perfekteco (p. 259); due, tia lingvo estus senfine komplika, unuigante en si specifon kaj ĉarmon de diversaj lingvoj. En la eskima lingvo ekzistas ĉ. 100 vortoj por foko, en la argia estas same por kamelo, en la lakca+/ estas 52 kazoj, en la algona++/- 5000 formoj de verbo en pasinto. Tio estas sendube riĉo, sed ĉu ilin ĉiujn tiri en la internacian lingvon? Ermar Pavloviĉ skribas, ke tiu lingvo estos nura vortludo, tia kombino ne povas esti. Ellabora proceduro de la tutmonda lingvo estas ekstreme utopia kaj ne-

praktika. En la mondo ĉiujare okazas 3000 kongresoj, sed neniam dum ili estis io inventita. Watt, Fermi, Einstein faris siajn inventojn sole, same kiel d-ro Zamenhof, kaj kvankam ili estis burĝaj sciencistoj, iliaj inventoj daŭras vivi, perfektiĝi kaj servi kiel bazo de la civilizacio. Poste ilin povas plibonigi kiom ajn ankaŭ sciencistoj-marksistoj.

Ĉar ne ekzistas kriterioj de la perfekteco, vasta internacia forumo neniam venos al la interkonsento, ĉiu proponados siajn rimedojn. Ni vidas kiel multoble pli simplaj decidoj de la Unuiĝintaj Nacioj dum jardekoj revenas en la subkomisionojn. Se la konferenco estos kunvokita sur malpli larĝa bazo, ekzemple nur por socialismaj landoj, ĝi egale ne venos al la konsento kaj krome estos ne aŭtoritata por la tuta cetera mondo kaj sekve, senrezulta.

Ne, mi preferas stari sur la reala grundo de la neperfekta, tamen jam ekzistanta lingvo Esperanto, direktante sian inventemon al ĝia iompost-ioma plibonigo, ol sur la kimera ideo de la kreo de nova kaj destinita por forpuŝo de ĉiuj ekzistantaj lingvoj - universala lingvo.

Rimarkoj:

+/ Lakca lingvo apartenas al dagestana grupo de kaŭkazaj lingvoj. Ĝin parolas 80000 lakcoj, loĝantaj ĉefe en Dagestano (USSR).

++/ Lingvo de nordamerikaj indianoj; apartenas al algonkia lingva familio.

*El la rusa tradukis L.V. Medvedev*